

KITAKTO

A photograph of a living room with warm, yellowish lighting. In the foreground, a person with dark hair, wearing a white long-sleeved shirt and grey jeans, is lying on their back on a large, circular, patterned rug. They are watching a television set that is part of a large wooden media console. The TV screen shows a bright, somewhat blurry image. On the floor next to the person's feet are a pair of dark shoes. The background features a bookshelf filled with books and various decorative objects, and a desk with a lamp on the right side.

Televido

numero 233 (2009:5)

ISSN 0023-3692

fotita de Jo Galdi, permesilo CC-BY

ENHAVO

La televido en Brazilo: ne komunikilo, ja dominilo

(Felipe de Oliveira Queiroz, Brazilo) 3

Televido – ĉu kuracilo aŭ malsano?

Ruben Feldman Gonzalez, Meksiko 4

La projekto CETI: ĉu interstela televido?

(Amri Wandel, Israelo) 5

La latina – ĉu morta lingvo, ĉu renovigo?

(François Parchemin, Francio) 9

Televida prezentado de printempa festo en Ĉinio

(Alice Llu, Ĉinio) 11

Cerbaj Olimpikoj (Aleksandro Galkin, Rusio/Germanio) 13

Zhuang – malmulte konata popolo de Ĉinio

(Gabriele Corsetti, Italio) 16

Venu por ĝui (Recenzo) 18

Diskuto inter surduloj (Woudji Kossi, Togolando/Senegal) .. 20

Saluton, karaj legantoj de Kontakto!



Tiu ĉi numero (ja iom pli granda, ol kutime) estas ĉefe dediĉita al la anoncita temo “Televido”. Ĉion eblas ne nur laŭdi, sed ankaŭ kritiki – kaj kelkaj niaj aŭtoroj ĝuste kritikas televidon! Eksciu, ĉu trafe? Krome vi trovos ankaŭ kelkajn alitemajn artikolojn, inter ili – recenzon kaj facilan tekston.

Mi deziras al ĉiuj agrablan legadon kaj atentigas pri tre grava anonco, trovebla sur la malantaŭa kovril-paĝo. Bonvolu aktive partopreni en la anoncita tie enketo – tio helpas plibonigi la revuon!

Paŭlo
la redaktoro

Kiel sendi kontribuojn al Kontakto?

- ✓ Sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan.
- ✓ Se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- ✓ Kontakto ne estas movada revuo, do ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!
- ✓ Indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo.
- ✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ Dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ Rete bonvolu sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ Ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj!

Temoj de la venontaj numeroj de Kontakto

Numero 234 (2009:6). La ĉef-temo: “Idoloj”.

Ĉu estas bone aŭ malbone havi idolojn? Ĉu idoloj helpas aŭ malhelpas al ni fari personan elekton? Rakontu pri la homoj, kiuj laŭ via opinio grave influis vian vivon aŭ la vivon de via lando! **Rapidu pri kontribuo!**

Numero 235 (2010:1). “Moderna arto”. Ĉu la moderna amas-kulturo meritas la nomon “arto”? Ĉu la novaj teĥnologioj mortigas la arton aŭ male – donas al ĝi novan elanon? Ĉu en la moderna mondo la tradiciaj artoj plu havas la iaman gravecon? Rakontu pri viaj impresoj kaj ŝataĵoj en la moderna artista mondo! **Planata limdato: la 15-a de januaro.**

Kiel ĉiam, ajnatemaj kontribuoj estas bonvenaj kaj ege bezonataj!

KONTAKTO: Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). Fondita en 1963. **N-ro 233** (2009:5), 44-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ 90 landoj. **TTT-paĝo:** <<http://www.tejo.org/node/7>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA:** ☒ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44; fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio:** Kontakto, ul. Rabochaja 24, kv. 29, Jalto, Krimeo, UA-98612, Ukrainio; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>. **Redaktoro:** Paŭlo Moĵajev (Ukrainio) **Tipografisto:** Lucas Vignoli Reis (kun helpo de skipo de Preface Design, <<http://www.preface.com.br>>). **Korektisto:** Aleksandro Galkin (Rusio/Germanio). **Presado:** Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj:** Joel Amis (Usono), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Daniel Richard Bebelacqua Acosta (Urugvajo), Daniele Binaghi (Italio), Olivier Gaudefroy (Francio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Maksim Petrov (Kazaĥio), Saliko (Finnlando), Aneta Ubik (Germanio), Jefim Zajdman (Ukrainio). **Facilinvaj Artikoloj** estas verkitaj en la niveloj *tre facila kaj facila*, laŭ la vortolisto de Kontakto. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare. **Anonctarifo:** tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas double. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas makleraĵon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anoncetajo:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn kontraŭ dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifo:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj:** povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Salahutplein 40, NL-5262 ZN Vught, Nederlando. **Kontakto en radioj:** Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): Radio Havano (Kubo) Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio / 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea / 19:30, 22:00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15-a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

La televido en Brazilo: ne komunikilo, ja dominilo

Tiu artikolo estas inspirita de la dokumenta filmo “Além do Cidadão Kane”, produktita de la televid-kanalo BBC kiel “Beyond Citizen Kane” en Londono. Ĝi estis lanĉita en 1993 kaj tuj malpermesita en Brazilo, kvankam tiam ni teorie vivis jam en demokratio. Mi sukcesis konatiĝi kun ĝi dank’ al interreto, kaj dum la spektado mi rememoris plurajn okazintaĵojn de mia frua infanaĝo. Krom la elementoj de tiu filmo, ĉi artikolo riĉas ankaŭ je aliaj faktoj kaj datumoj.

Felipe de Oliveira Queiroz, Brazilo

Pluraj eksterbrazilanoj, precipe nordamerikanoj kaj eŭropanoj, ektimas, kiam ili aŭdas, ke en Brazilo unusolacia televid-grupo povas esti spektata de pli ol 70% de la spektantaro en pluraj momentoj, eĉ dum horoj, dum pluraj tagoj: temas pri la televid-reto “Globo”. Verŝajnege, ĝi estas la plej potenca televid-reto de la tuta mondo. Sed kial tiu bizara okazo?

Laŭ la Brazila Instituto pri Geografio kaj Statistiko (*Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística – IBGE*) la esploroj de la jaro 2000 (ne tro malaktualaj) montris, ke 13,6% de la homoj en la aĝo 15+ estas analfabetaj (notu, ke en Brazilo por ne esti konsiderata kiel analfabeta, por la homo sufiĉas scipovi skribi sian propran nomon). Antaŭe, kompreneble, tiu ĉi procentaĵo estis multe pli alta. Ne forgesu: malgraŭ tio, ke Brazilo havas unu el la dek plej grandaj ekonomioj de la mondo, ĝi ankoraŭ ne estas “lando de la unua mondo” pro la abismaj malegalecoj.

La televido estas la ununura komunikilo, kiu trafas kaj atingas la grandan publikon. Ĝi transmisias multege da propagando kaj proponas spacon simple al tiu, kiu plej multe pagas. La pagoj foje atingas milionojn da realoj aŭ eĉ dolaroj. Bankoj, grandaj industrioj, poluaj entreprenoj, vendejoj de transgenaj manĝaĵoj – ĉiuj feliĉe pagas kaj anoncas sin televide, ne gravas ĉu ilia propagando estas mensoga aŭ eĉ friponeca. Kaj la malriĉaj brazilanoj, plejparte sen aliro al la bonaj eduksistemoj, simple estas trompataj ĉiutage per pluraj “aĉetu”, “tiu estas bona”, “mi diras la veron”, ktp. Ni estas devigitaj toleri ne nur tiujn fiajn reklamojn, sed ankaŭ internacie famajn dramseriojn kiuj ankaŭ kaŝe diktas, kion oni devas aŭ ne devas fari.

En la jaro 1964 en Brazilo komenciĝis diktatora konservativa periodo, kiu daŭris ĝis 1985. Komence konservativaj armeanoj arestis multajn homojn kaj forigis la elektitan prezidenton de lia posteno tuj post lia anonco de milda politiko pri distribuado de nefruktodonaj bienoj kaj kelkaj

malprivatigoj. La televidilo trompe anoncis, kompreneble, ke la “demokratia revolucio” furore sukcesis, kiam diktatore enposteniĝis altnivela armeano.

La televid-reto Globo estis kreita en 1965 (tuj post la politikaj ŝanĝoj) kiel tutnacia informilo de la aŭtoritata reĝimo kaj disvolviĝis dank’ al mona subteno de la usona entrepreno “Time Life”, kiu supozis, ke en Brazilo ekzistis merkata niĉo por ili. Poste, jam en 1969, parlamenta esploro konkludis, ke la partnereco inter Globo kaj Time Life estis kontraŭleĝa, la akord-periodo finiĝis, tamen la investadoj jam okazis kaj helpegis la bankroton de la rivalantaj televidilaj retoj.

Jam en la jaro 1970 la prezidento Emilio Médici profitis la ekzistantajn televidilajn aparatojn por anonci al la brazilanoj, ke la lando iras laŭ la ĝusta vojo dank’ al la sukceso de Brazilo en la futbala mondpokalo (en Meksiko) kaj boksado, kvazaŭ la diktatoreca reĝimo helpus la sportojn. Tamen, la torturoj, aplikataj al la kontraŭreĝimuloj, kritikoj, vundoj kaj mortoj pro la lukto inter dekstruloj kaj maldekstruloj neniam estis anoncataj per la amaskomunikiloj. La ĉefregulo estis komuniki tiel, kvazaŭ ĉio estas tute paca.

Post la fino de la arma aŭtoritata periodo pro la industriigo kaj disvolviĝo de la lando la televidiloj multnombriĝis kaj la povo de Globo proporcie kreskis. Do nun la povo de Globo estas eĉ pli granda, ol la povo de la nacia registaro. Kaj, kompreneble, la plej pova televid-reto forgesigis la brazilanojn pri sia antaŭa sinteno al la politika situacio en al lando. Nun la cenzuro konsistas nur el ekonomia cenzuro: kiu povas pagi, tiu opinas, kantas kaj anoncas kion ajn; kiu ne povas pagi – tiu fatale ne povas diri ion ajn.

Kompreneble ne nur Globo estas problema, fakte ĉiuj grandaj televid-retoj en plia aŭ malplia grado estas tiaj. Alia ekzemplo de tio estas la reto “Record”, kies posedanto,

s-ro Edir Macedo, estas ankaŭ fondinto kaj estro de la evangelia religio nomata "Universal". Tiu paro estas la or-ova kokino, kiu perlaboras dank' al la fido de la homoj, al kiuj ĝi promesas "miraklojn", postulante de ili "nur" dekonon de ilia salajro.

Fakte, la vera demokratio ne povas ekzisti, se la komunikiloj ne estas demokratiigitaj. Esperantistoj jam

delonge perceptis tion kaj tial provadas demokratiigi la lingvan politikon. Tamen, ankoraŭ mankas la vere seriozaj provoj findemokratiigi aliajn vojojn de la komunikado. Kaj plie – ni devas plibonigi la edukadon en ĉiu lando, ĉar la eduko estas la ununura socia liberiĝo kontraŭ tiuj aĉaj dominoj.

ARTIKOLO

Televido – ĉu kuracilo aŭ malsano?


Oni ofte diras, ke televido estas fabriko de iluzioj, sed necesas pripensi ĉu ĝi mem ne estas plej granda iluzio de la moderna mondo?

Ruben Feldman Gonzalez, Meksiko

Ni kredas, ke televido informas nin, sed ĝi estas ankaŭ la fonto de misinformado kaj malinformado. Ni ne scias, kiu fakte kontrolas la televidon kaj tion, kion ni vidas per televido. Tamen, nur post iom da pripensoj iĝas klare, ke televido ne estas demokratia: tiuj, kiuj kontrolas televidon, estas la samaj uloj, kiuj posedas 95% de ĉio surtere. Nur tiuj, kiuj povas pripagi la televidan tempon, povas paroli per televido. La malriĉuloj povas nur rigardi ĝin, do, ĝi estas ilo de riĉuloj.

Televido grave kulpas ankaŭ pri pluraj pliaj misfaroj: katodaj radioj malbonigas la vidkapblon, idiotigas la spektantojn, malfortigas atenton kaj memoron, ilas por politika subpremo kaj ekonomia konsumado. Televido estas malamiko de la familia komunikado (ĉar forrabas la tempon, kiun ni povus pasigi en kontakto kun aliaj personoj aŭ kun la naturo), iĝas ĉiam pli kaj pli perforta kaj vulgara, ktp. La tuta kolektiva konscio estas nutrata de televido. La rezultoj de tio estas videblaj en la homa socio ĉie en la mondo: milito kaj perforto, nutrataj ĝuste fare de la televida fraŭdo.

Bona televidanto estas malkonektita de sia propra menso, de sia familio kaj de la socio. Resume, televido estas psikosocia karcero. Ĉu eble venis tempo, por ke ni kuraĝe ĵetu televidilon en rubujon?



Fotita de Neil Schelly, permesilo CC-BY-NC-SA

La projekto CETI: ĉu interstela televido?

La demando, ĉu ekzistas vivo ekster la tero, ĉiam fascinis la homaron. La projekto CETI (anglalingva akronimo por “Komunikado kun Ekstertera Intelekt”) provas science esplori, kiel komunikiĝi kun eksterteraj civilizacioj. Ni trarigardos la eblojn kaj metodojn de interstela komunikado: kiel malkovri eksterterajn civilizaciojn kaj kiel komunikiĝi kun ili? Ni vidos ke la televida teknologio estas verŝajne la plej adekvata solvo.

Amri Wandel, Israelo

CETI: serĉado de ekstertera intelekto

Oni ofte demandas, ĉu ekzistas ekster-teraj raciaj estaĵoj. Malpli ofta demando estas, kiel kontakti ilin kaj kiel komunikiĝi kun tiaj estaĵoj, se ili ekzistas. Tio povas esti tre malfacila tasko, ĉar supozeble tiuj estaĵoj ege diferencas de ni kaj troviĝas ege malproksime. Se ni tamen trovus eksterterajn civilizaciojn kaj kontaktus kun ili, ni povus multe progresi en ĉiuj terenoj, ĉar la homa historio pruvus, ke kulturaj interŝanĝoj ĉiam riĉigis kaj fekundigis la kontaktantajn kulturojn. Sed kiel ni povas trovi ilin, kaj, jam trovinte, kiel komunikiĝi kun ili? Kiel komprenigi niajn mesaĝojn al aliaj civilizacioj kaj kiel deĉifri eventualajn mesaĝojn de ili? Por respondi tiujn demandojn en la sesdekaj jaroj de la dudeka jarcento oni lanĉis la projekton CETI: Komunikado kun Ekstertera Intelekt.

La sciencfikcia metodo serĉi kaj kontakti eksterterajn civilizaciojn, priskribita en la televida serio “Star Trek” (“Stel-migrado”) – “kuraĝe iri, kien neniuj iris antaŭe, por serĉi novan vivon kaj novajn civilizaciojn”, bedaŭrinde, ne estas realisma. Per la nuna tekniko, vojaĝo al la plej proksima stelo, Alfa Centaŭra, daŭrus 40 000 jarojn. Eĉ se ni scipovus konstrui rapidegajn kosmoŝipojn, kiuj kapablas flugi kun la rapido proksima al tiu de la lumo – la plej alta ebla laŭ la leĝoj de fiziko – la vojaĝo al la najbaraj steloj daŭrus dekojn da jaroj, kaj la kosto de tia vojaĝo estus giganta. Krome, eĉ laŭ la plej optimismaj taksoj, steloj kun civilizacioj estas raraj, do plej verŝajne la granda vojaĝo al iu ajn stelo estus vana. Ni devas pensi pri pli efika metodo serĉi intelektan vivon. Pro la samaj argumentoj, cetere, estas malverŝajne, ke iuj eksterteraj civilizacioj provus efektive atingi nin per kosma vojaĝado, sekve la seriozaj sciencistoj ne kredas, ke la t.n. NIFOj – neidentigitaj flugantaj objektoj – estas ligitaj al eksterteraj civilizacioj.

Pli efika metodo: radiosignalo

Elektro-magnetaj ondoj estas la plej rapida mesaĝanto:

ili moviĝas kun la rapido de la lumo. Ilia elsendado ne postulas multajn rimedojn – nur taŭgajn radio-sendilojn kaj antenojn. Oni povas supozi, ke teknike progresanta civilizacio produktas radi-ondojn, kiel okazas ĉe la nia – eĉ la surteraj radio-elsendoj povas esti ricevataj en la kosmo. Kompreneble, en la kazo de nia civilizacio, tiuj radi-ondoj ne ekzistas longan tempon; konsiderante ke la radi-elsendoj ekzistas nur dum ĉirkaŭ cent jaroj, nia civilizacio estas ĝis nun malkovrebla de aliaj aŭskultantoj nur je distanco de maksimume cent lum-jaroj de la Tero (la distanco, je kiu niaj unuaj radi-elsendoj ĝis nun disvastiĝis en la kosmon). En realo, la distanco estas multe malpli granda, pro la malhelpo de la natura fona radio-bruo kaj depende de la ricev-kapablo de la aliaj ricevantoj: niaj surteraj radi-elsendoj estas verŝajne tro malfortaj.

Supozeble, la civilizacioj pli progresintaj, ol la nia, ekzistas dum multe pli longa tempo, ol ni, kaj havas pli fortan kapablon elsendi radi-ondojn. Tiujn elsendojn ni povas provi ricevi – por tio ni ne devas sendi multekostajn kosmoŝipojn, kiuj atingos la celon nur post miloj da jaroj. Ni povas aŭskulti jam nun, kaj ni povas aŭskulti de ĉiuj direktoj. Por ricevi radio-elsendojn de la kosmo, oni bezonas tre sensivajn ricevilojn. Tiaj riceviloj estis konstruitaj en la lastaj kvindek jaroj por studi la (nature) kosmon – ili nomiĝas radio-teleskopoj kaj aspektas kiel grandegaj teleroj kun diametro de dekoj da metroj, kiuj enfokusigas la radio-ondojn. La plej granda radio-teleskopo de la mondo havas diametron de 300 metroj kaj situas en Arecibo [Aresibo], en Porto-Riko.

Unufoje oni uzis la radio-teleskopojn por spuri artefaritajn elsendojn de aliaj civilizacioj en 1960, uzante la radio-teleskopon de la observatorio Green Bank en okcidenta Virĝinio (Usono) kun 25-metra telero (la t.n. “projekto Ozma”). De tiam estis faritaj dekoj da serĉo-kampanjoj por trovi signojn de ekstertera civilizacio, sed ĝis nun estis trovita neniuj signalo, kiu povas esti interpretita



La plej granda radio-teleskopo en la mondo (Observatorio Arecibo, Porto-Riko). NASA

kiel nenatura, intelekto produktita elsendo (krom unu dubinda kazo, kiu ricevis la nomon “la Wow-signal”, sed poste estis neniam retrovita).

Natura aŭ artefarita signalo?

Serĉante signalojn de la kosmo, ni unue devas zorge certigi, ke la radio-signaloj, kiujn ni ricevas, ne venas de la surteraj fontoj, kiuj ja abundas: regulaj radiofoniaj kaj televidaj elsendoj, radaroj, navigiloj kaj komunikiloj de civilaj kaj armeaj aviadiloj kaj satelitoj ktp. Eĉ se la ricevita signalo venas el ekster-tera fonto, ĝi povas esti natura fenomeno, kaj ne komuniko de alia civilizacio. El la kosmo alvenas multaj radi-ondoj el naturaj fontoj: nia Suno, aliaj steloj, varma interstela gaso kaj galaksioj emisias radi-ondojn en ĉiuj frekvencoj. Aldone la tuta kosmo estas plena je mallongaj radio-ondoj (ondolongo de 0,5 cm), kiuj estas la “ĉĥo” de la pra-eksplozo, kiu kreis la universon. Kiel fari distingon inter naturaj radi-ondoj kaj artefaritaj signaloj? Supozeble la signaloj, kiuj venas de iu civilizacio, havas certan strukturon kaj estas iusence regulaj, kontraŭe al la senorda bruoj, kiuj venas de naturaj fontoj.


Sed ne ĉiam tiu kriterio funkcias: en la jaro 1967 brita studentino de astronomio, kiu okupiĝis pri radio-esplorado de la planedoj, malkovris regulan radio-signalon, kiu ripetiĝis tridek fojojn sekunde. La signalo estis ekstertera, eĉ el ekster la Sunsistemo, ĉar ĝi aperis ĉiam, kiam la radioteleskopo estis direktita al certa punkto de la ĉielo, fiksa rilate al la steloj. Tiu malkovro kaŭzis

grandan entuziasmon, ĉar oni kredis, ke ĝi estas signalo de ekstertera civilizacio, kvazaŭ morsa kodo. Pro tio oni signis tiun radiofonton (kaj aliajn similajn fontojn, kiuj estis malkovritaj poste) per la kodo LGM – akronimo de “Little Green Men” (“verdaj hometoj”, en la angla). Tamen intertempe la sciencistoj trovis, ke temas pri specialaj stelecaj objektoj, kiujn oni nomis “pulsaroj”, kiuj elsendas mallarĝan radio-faskon en difinitan direkton. Pro tio, ke la pulsaroj rotacias tre rapide, ni vidas radio-pulson nur tiam, kiam la radio-fasko estas turnita en nian direkton (kvazaŭ la signalo de lumturo).

Frekvenco

Same kiel hejma radio-ricevilo, ankaŭ radio-teleskopoj povas ricevi ondojn en plej diversaj frekvencoj aŭ ondolongoj. Kiun frekvencon uzi por serĉi signalojn de alia civilizacio? Ekzistas preskaŭ senfina nombro da ebloj! Baza kondiĉo estas, ke la natura radio-bruo estu kiel eble plej malalta, kaj ke la interstela gaso kaj nia atmosfero estu travideblaj al la ondoj kun tiu ondolongo. Tiuj kondiĉoj limigas nin al ondolongoj de 3-100 cm. (frekvencoj de 300-10 000 MHz).

Ankaŭ ene de tiu regiono ekzistas multegaj ebloj, kaj estas malverŝajne, ke intelekto-hava civilizacio malŝparos sian energion elsendante ion en ĉiuj frekvencoj! Tamen, ekzistas frekvencoj, kiuj estas kvazaŭ universalaj: la frekvencoj ligitaj al atomaj energi-ŝtupoj de kosme abundaj elementoj. La plej elstara el tiuj estas la baza frekvenco



de la hidrogena atomo – la plej abunda materialo en la kosmo. Tiu frekvenco estas 1 420 MHz (kio korespondas al ondolongo de 21 centimetroj). La ondolongo-regiono ĉirkaŭ 21 cm. (kiu en la profesia ĵargono nomiĝas “la akvo-truo”) havas plian avantaĝon: en ĝi la interstela spaco estas travidebla kaj tre kvieta, do oni povas elsendi signalojn je grandaj distancoj kun minimuma interveno de natura radio-bruo. Supozeble ankaŭ la eksterteranoj konas tiujn sciencajn faktojn kaj uzas la samajn argumentojn por elekti tiun ondolongon por interstela komunikado.

Komunikado kun eksterteraj civilizacioj

Alia demando estas, kiel aliaj civilizacioj povas ekscii pri nia ekzisto, kaj ĉu eblas interstela komunikado. Niajn surterajn radio-elsendojn oni ne povas ricevi tre for de la Suna Sistemo, eĉ per la plej potenca ricevilo, ĉar ili estas malfortaj kaj ne estas direktitaj, disvastiĝas en ĉiujn direktojn, kaj post malgranda distanco (relative al la gigantaj distancoj inter la steloj) fariĝas pli malfortaj, ol la natura bruo. Tamen, radio-teleskopojn oni povas uzi ne nur por serĉi artefaritajn signalojn el la kosmo, sed ankaŭ

inverse – por elsendi fortajn radio-signalojn en difinitajn direktojn, kio ebligas al la sendita signalo resti pli forta, ol ĉe la ordinara dissendado en ĉiujn direktojn.

Per la nunaj plej fortaj radio-teleskopoj oni povas sendi kaj ricevi signalojn je distanco de miloj da lumjaroj (supozante, ke ĉe la alia flanko ekzistas simila radio-teleskopo). Se la elsendo estus direktita al stelo kun civilizacio, teorie eblus komuniĝi kun ĝi. Estus nur du malfacilaĵoj por la konversacio: unue, ĝi estus tre malrapida: ekzemple, se la alia civilizacio troviĝus je distanco de 500 lumjaroj, la tempodaŭro inter sendo de mesaĝo ĝis la ricevo de respondo estus minimume mil jaroj (se ili respondus tuj post ricevo de la mesaĝo). La dua problemo estas eĉ pli komplika: kiun lingvon uzi? Kiel ili komprenus niajn signalojn kaj kiel ni povus decifri la iliajn?

Kiun lingvon uzi?


Ni certe ne povas supozi, ke la eksterteranoj komprenas niajn lingvojn aŭ eĉ rekonas niajn grafikajn signojn. Oni devos do uzi universalajn simbolojn – ekzemple tiujn de matematiko. En 1820 matematikisto Karl Gauss proponis

forhaki arbojn de la siberia arbaro en la formo de giganta triangulo, kiu demonstrus la geometrian teoremon de Pitagoro. Tio povus sciigi al eksterteruloj sur Luno aŭ aliaj planedoj, ke sur la Tero vivas racaj estaĵoj. Cent kvindek du jarojn poste sur la esplor-satelitoj Pioneer-10 kaj Pioneer-11, senditaj en kosmon for de la Sunsistemo, oni metis orumitajn platojn, sur kiuj estis gravurita mesaĝo por la eksterteranoj, kiuj eventuale trovos tiujn satelitojn. La mesaĝo konsistis el desegnaĵoj de viro kaj virino, de la Suno kaj la naŭ planedoj, kaj de “mapo”, kiu klarigas la situon de la Suno relative al la steloj.

Tamen, kiel ni jam diskutis, la ŝanco, ke eksterteranoj efektive trovos tiujn satelitojn, estas praktike nulo. Multe pli promesoplena kontaktomaniero estas radio-komunikado. Sed kiel transsendi mesaĝon per radio-ondoj? Restante ĉe grafika reprezentado, eblas adopti la principon de televida elsendo: dividi la “bildon” al linioj kaj kolumnoj kaj reprezenti ĝin per la binara metodo: serio de nuloj kaj unuoj por signi blankajn kaj nigrajn kvadratojn. En la jaro 1974 oni uzis la renovigitan radio-teleskopon de Arecibo por sendi mesaĝon (la t.n. “mesaĝon de Arecibo”) en la direkton de la granda stel-amaso M13, kiu estas densa globforma grupego de ĉ. 300 mil steloj, situanta 24 mil lumjarojn for de la Tero. La mesaĝo estis desegnaĵo dividita en 73 liniojn kaj 23 kolumnojn (pro tio, ke ambaŭ tiuj nombroj estas primaj, tio ĉi estas la sola maniero dividi la 1679 erojn de la elsendita sinsekvo – kaj tial la ricevintoj povos facile trovi la linian dividon). La bildo enhavis krudajn skemojn de informoj pri ni: diagramon de la Sun-sistemo, de nia aspekto kaj la homa biologio (bazaj molekuloj kaj la DNA-strukturo). La tuta elsendo daŭris tri minutojn, sed respondon oni atendu ne pli frue ol post 50 mil jaroj. Kaj eble – eĉ neniam...

Konkludo

La demandoj, ĉu ekzistas ekster la Tero aliaj civilizacioj, eventuale multe pli evoluintaj ol la nia, kaj ĉu ni povas ilin malkovri kaj komunikiĝi kun ili ankoraŭ ne havas respondon. Pro la manko de scio, kiel evoluas vivo kaj intelekto kaj kiom longe ekzistas “tipa” civilizacio, ni ankoraŭ ne povas taksu la nombron de civilizacioj: ĉu en la Galaksio ekzistas ankoraŭ multaj aliaj civilizacioj, aŭ ni estas la sola. La serĉado de radio-signaloj de eksterteraj civilizacioj dum la lastaj kvar jardekoj ne donis iujn ajn pozitivajn rezultojn, sed tio povas ankaŭ signifi nur, ke niaj riceviloj aŭ eventuale serĉo-strategioj estis ne sufiĉe bonaj por venki la nekredeble grandajn interstelajn distancojn. Kontakto kun ekstertera civilizacio povus progresigi la homaron al neimageblaj horizontoj kaj tial indas daŭrigi la serĉadon, malgraŭ la ĝisnunaj negativaj rezultoj.



La “mesaĝo de Arecibo”, prezentita kiel bildo (apartaj inform-blokoj estas diverskoloraj emfazitaj).

CC-BY-SA

1. "Intelligent life in the Universe", I. S. Shklovskii kaj C. Sagan, 1966, Cambridge, Mass.
2. "Is anyone out there?", F. Drake kaj D. Sobel, 1992, New York.
3. "Ĉu ni estas solaj? La serĉado de vivo ekster la tero: ĉu ekzistas aliaj civilizacioj, kaj kiel komuniki kun ili?" A. Wandel, 1997, Kontakto n-ro 157 (1997:1).
4. "Ĉu ni estas solaj?", A. Wandel, Internacia Kongresa Universitato, 1998, red. A. Wandel, Montpeliero, Francio. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 88 p.
5. "La Kosmo kaj Ni", A. Wandel kaj D. Galadi-Enriquez, FEL, 2001 (dua eld. 2005).

La latina – ĉu morta lingvo, ĉu renovigo?

*Tiu, kiu interesiĝas pri lingvoj kaj ŝatas legi kuriozajn informojn, certe lastatempe ion legis pri la latina. Eĉ se vi ne kutimas al specialaj revuoj, vi eble renkontis artikolon, kiu asertas, ke la latina lingvo revigliĝas. Mi legis pri tio diversajn artikolojn en la franca gazetaro, kaj ili instigis mian intereson. Inter la novaĵoj pri la antikva lingvo mi malkovris, ekzemple, ke kadre de la Eŭropa Latin-Greka Festivalo¹ en Nanto okazis latinlingva konkurso SMS², ke la membroj de **Circulus Latinus Lutetiensis**³ (Pariza Latina Rondo) ĉiumonate kunvenas por parole praktiki la Ciceronan lingvon, kaj ke la nova latin-instrua eldono estas plej aktive vendata ĉe Assimil (fama eldonejo, kiu specialiĝas pri eldonado de lingvo-kursoj) – la latina cedis pri populareco nur al la angla, la hispana, la itala kaj la ĉina.*

François Parchemin, Francio

Mi mem lernis la latinan en kolegio kaj konservis bonegajn rememorojn pri la juna Quintus, heroo de la dialogoj de la lernolibro, kiu laboris en vilao kaj travojis la antikvan mondon de Gaŭlujo ĝis Egiptujo. Mi estas danko al la latina, kies studo helpis al mi kompreni la gramatikon de mia propra lingvo. Vi do povas imagi, ke la legado de tiuj novaĵoj pri la latina ĝojigis min, eĉ se mi ne parolas la latinan kaj apenaŭ memoras la deklinaciojn. Tial mi decidis profundigi miajn sciojn pri la lingvo per libro antaŭnelonge tradukita el la germana: "La latina estas morta, vivu la latina! Eta historio de granda lingvo"⁴.

La aŭtoro, Wilfried Stroh, estas filologo en Munkena Universitato. Li ne limigas sin je traduko de antikvaj tekstoj, sed praktikas vivan latinon, ekzemple, kiel latinlingva parolisto ĉe televido aŭ latinlingva ĉiĉerono en sia urbo. Li eĉ amuziĝas dubli la filmojn, kies agado okazas en

antikva Romio, en la "lingvon de la originalo". Per tiu libro li disponigas koncizan, sed kompletan historion de la latina lingvo. Al la teksto kaj la latinlingvaj ekzemploj, kiujn li uzas, ne mankas humuro. Pro tio, ke la aŭtoro ambicias rakonti la historion de 2500 jaroj sur nur 300 paĝoj, al la libro kompreneble mankas detaloj, sed tio ne gravas, ĉar koncizeco ne forigas kompletecon kaj eĉ ebligas rapidan legadon sen enuo.

Interese estas konstati, ke la romia periodo okupas malpli ol duonon de la libro. Fakte estas grave kompreni, ke la latina estis ne nur la lingvo de antikvaj romianoj, sed ankaŭ la ĉefa lingvo por pensi, skribi, komunikiĝi dum pluraj jarcentoj en ĉiaj fakoj (beletro, historio, juro, scienco, ktp.). Tion oni, bedaŭrinde, ne ĉiam klarigas al la lernantoj. Kompreneble, Wilfried Stroh preparolas la ĉefajn klasikajn verkistojn kiel Cicerono, Vergilio, Horacio kaj la unuajn

kristanajn verkistojn kiel Tertuliano aŭ Laktancio. Tamen eblas malkovri ankaŭ la latinlingvajn verkojn de Boecio, Petrarko aŭ Erasmo. La aŭtoro tiamaniere klarigas, kiel la lingvo trapasis la jarcentojn ĝis hodiaŭ.

La kerna temo de la libro estas demando pri la morto de la latina. La aŭtoro komencas klarigi la esprimon “mortinta lingvo”, kiu estas biologia metaforo: lingvoj estas vivantaj, kiam ili evoluas, kaj estas mortintaj, kiam ili ĉesis evolui. Per tio la tezo de Wilfried Stroh iĝas klara: la latina mortis du mil jarojn antaŭe, kiam ĉia evoluo de la lingvo ĉesis post Cicerono kaj Virgilio – tion la aŭtoro demonstros per la studo de tekstoj. Plie, la aŭtoro asertas, ke “dank’ al morto la latina iĝis senmorta”. Poste aperis diglosio (dulingveco): la skriba latina, transdonata de la *grammaticus* (instruisto) iom post iom diferenciĝis de la vulgara latina, kiu iom post iom evoluis al latinidaj lingvoj. De tiu vulgara latino, ĉiutage parolata de la romia strathomo, Stroh citas al ni plej kortuŝan kaj amuzan versaĵon:

*Amores ignes si sentires, mulio,
Magi properares ut videres Venerem [...]
Bibisti, iamus, prende lora et excute:
Pompenos defer, ubi dulcis est Amor.*

Se vi sentis la fajron de l’ amo, mulisto
Vi veturos pli rapide por vidi Venuson [...]
Vi drinkis, ni iru, prenu la kondukilojn kaj rapidu:
Iru al Pompejo, kie dolĉa estas la Amo.

Tiun aman poemon oni trovis sur la muroj de Pompejo. Nur la pompeja katastrofo konservis tiujn versojn de amanto, kiu instigas sian koĉeron rapidiĝi piede pro tio, ke tiu ebrias por mul-gvidado...

Tiu latina lingvo mortis, sed Wilfried Stroh notas, ke la lingvo mortis ne unufoje. La unua morto, kiu okazis en la stato de beleco, estis la plej fundamenta, sed ĉiuj mortoj gravas por ke la latina atingu sian nunan situacion. La dua morto okazis, kiam la kursoj de la *grammaticus* malaperis pro la popolmigradoj. Nur Karolo la Granda restarigis la instruadon de la lingvo – kaj tio kondukis al la Karolida Renesanco, la periodo de beletra prospero. La tria morto okazis, kiam fine de la Mezepoko la latina perdis sian beletran potencon. Ĉi-foje la Humanistoj renovigis la lingvon. Tute alia estis la kvara morto de la latina, kiu okazis en la 17a kaj 18a jarcentoj, kiam kontraŭ ĝi ekstaris la naciaj lingvoj.

Tamen, kiel fenikso la latino ŝajnas kapabli ĉiam renaskiĝi. Nia aŭtoro eĉ parolas pri la “latina sorĉo” kaj resumas sian libron per tiuj versoj de Josef Eberle, verkisto de la 20-a jarcento:

*O quoties obitum linguæ statuere latinæ!
Tot tamen exequiis salva superstes erat!*

Ankoraŭ kaj ĉiam oni dekretas la latinan
lingvon morta!
Tamen ĝi postvivis, tute sana, ĉiun funebron!⁶

Studante la libron, mi ekkonsciis la proksimecon inter la latina kaj Esperanto. La subtenantoj de ambaŭ uzas la samajn argumentojn por varbi lernantojn: universaleco, propedeŭtiko, logikeco... La Karola reformo de instruado atribuis al la latina la statuson de dua lingvo – kaj ĝuste tio savis la latinan laŭ Wilfried Stroh. La paralelon kun la Zamenhofa “dua lingvo por ĉiu” oni ne povas eviti.

Propono de la latina por la rolo de internacia helplingvo, ekzemple kadre de Eŭropa Unio, estas jam malnova ideo. Stroh ne aludas la demandon, sed emfazas la efikecon de la latina dum jarcentoj por internaciaj rilatoj inter kleruloj, tamen subtenante multlingvecon. Por emigi la leganton al rezisto kontraŭ hegemonio de la angla, Wilfried Stroh skribas: “La latina estis la gepatra lingvo de neniu, sed ĉiu havis parton ene de ĝi; ĝi gajnis la statuson de universala lingvo dank’ al intelektaj prodaĵoj de la romianoj en antikveco. [...] Kiam Galileo publikigis sian verkon unue en sia gepatra lingvo, sed ne en la latina, la germano Kepler protestis, ĉar li ne komprenis la italan. Li uzis originalan dusencan formulon, li parolis pri *crimen læsæ humanitis* – krimo tiom kontraŭ homaro, kiom kontraŭ kulturo.”⁷

Mi aldonas, ke la latina neniam minacis lokajn lingvojn. Dum Mezepoko aŭ moderna epoko, la latina havis apartajn funkciojn (ekz. liturgia, jura, scienca, ktp.), sed ne estis uzata kiel ĉiutaga lingvo. Koncerne la antikvan epokon, se Romio estis imperiisma ŝtato, ŝajnas, ke ĝi ne havis agreseman lingvopolitikon. En la unua ĉapitro de sia libro Wilfried Stroh eĉ subkomprenigas, ke la latina ne havis hegemonian intencon. Dum longa tempo la greka restis la kultura lingvo en Romio dum la romianoj mem neniam trudis sian lingvon al la subigitaj popoloj. En la konkeritaj teritorioj la latina estis nur la lingvo de la administracio.

Spite al kontraŭuloj, la latina (same kiel Esperanto) estas uzebla en la hodiaŭa mondo. Ekzistas leksikonoj kiel *Ad aeroportum!* (Al la flughaveno!) aŭ *Latin for All Occasions* (La latina por ĉiuj okazoj) por plivastigi la vortprovizon de la lingvo. Fakte, la ĉefaj baroj al la uzo de la latina kiel internacia lingvo restas ĝia malfacileco (kompare kun Esperanto) kaj troa eŭropeco. Tamen, se Esperanto ebligas transpasi la lingvajn limojn, “la latina ebligas tion, kion ebligas neniu moderna lingvo: transiron de la tempaj limoj, komunikadon kun la plej bonaj homoj de la estinteco, eniron en sentempan *respublica letterarum*. La latina estas la lingvo, en kiu skribis Cicerono, Tacito, Hieronimo, Einhard,

Dante, Petrarko, Erasmo, Kepler kaj Leibniz. Ili ĉiuj povus kompreni unu la alian tra la tempo. Ili ankaŭ hodiaŭ turnas sin per tiu lingvo al tiu, kiu scipovas la latinan; se ili vivus, ili komprenus eĉ la hodiaŭan latiniston.”⁸

PIEDNOTOJ

1. Vidu <http://www.festival-latin-grec.eu>
2. El la angla *Short Message Service* (“Servo de mallongaj mesaĝoj”) la regularo de la konkurso donis al tiu tutmonde konata mallongigo pli poezian signifon: *Sic Mundus Saltat* (“Tiel dancas la mondo”).
3. Vidu <http://www.circulus.fr>
4. Wilfried Stroh, “*Latein ist tot, es le Latein! Kleine*

Geschichte einer großen Sprache”, List Verlag, 2007. La franca traduko de Sylvain Bluntz sub la titolo “*Le latin est mort, vive le latin! Petite histoire d’une grande langue*”, Les Belles Lettres, 2008.

5. Paĝo 109 de la franca eldono.
6. Paĝo 279 de la franca eldono. Mi Esperantigis laŭ la franca adapto de Sylvain Bluntz.
7. Paĝo 222 de la franca eldono.
8. Paĝo 284 de la franca eldono.

RETE

<http://www.yleradio1.fi/nuntii/audi/> – mp3-formaj radi-elsendoj en la latina.

ARTIKOLO

Televida prezentado de printempa festo en Ĉinio

La Printempa Festo estas la plej grava el tradiciaj ĉinaj festoj, ĉar ĝi markas komencon de la nova jaro laŭ la ĉina luna kalendaro. La dato varias inter la tria tagdeko de januaro kaj la dua tagdeko de februaro. Antaŭvespere de la Printempa Festo ĉiuj familianoj kolektiĝas kaj ĝuas abundan festenon. Dum la nokto oni ne dormas, sed intime babilas kaj intergratulas bondezirante bonan komencon en la venonta ĉina novjaro. La disvastiĝo de televido aldonis al la festo novajn elementojn.

Alice Liu, Ĉinio

De la jaro 1983 la ĉina centra televido ĉiujare organizas grandiozan televidan prezentadon en antaŭvespero de la Printempa Festo. La prezentado daŭras ĉirkaŭ 5 horojn en granda studio de la televid-stacio kaj estas rekte elsendata al la tuta mondo per kelkaj kanaloj. Enketoj montris, ke last-jare la averaĝa kvanto de spektantoj de la prezentado atingis 34,82%, kaj en la nordaj provincoj de la lando la kvanto eĉ superis 80%.

Preparado por la prezentaĵo ĉiujare komenciĝas jam en septembro aŭ oktobro. La organizanto skizas la planon de la programo, kiu estas enhave ampleksa kaj kutime konsistas el dancoj, kantoj, ĉinaj tradiciaj operoj, humuraj dialogoj, prestidigitaj kaj skeĉoj. La aktoroj estas rigore elektataj el la tuta lando, kaj ankaŭ lokaj televid-stacioj reko-

mendas al la organizanto elstarajn aktorojn kaj verkojn. Por substreki la akordon de la granda familio de la ĉina nacio la organizanto invitas al la prezentado kantistojn ankaŭ el Honkongo, Makao kaj Tajvano. Dum kelkaj monatoj ili kelkfoje provludas kaj modifas la programerojn. Pro la reklama efiko multaj aktoroj penas aliĝi al la prezentado malgraŭ tio, ke la honorario pro la partopreno estas multe malpli granda, ol ĉe aliaj prezentadoj.

Magia forto de televido

En la jaro 1990, Zhao Benshan, senfama komediisto el nord-orienta urbeto, premieris en unu sceno de la ĉina centra televido. Li prezentis en skeĉo vilaĝanon, kiu venis en grandan urbon komisiite de sia filo por rigardi kaj prijuĝi



Televida prezentado de la Printempa Festo

estontan bofilinon kaj hazarde renkontis iaman amatinon. Humuraj paroloj en provinca dialekto kaj komika aspekto forte impresis la televidantojn. Dum la spektado oni ne povis sin deteni de rido. La persono de vilaĝano el nord-orienta Ĉinio furoris tra la tuta lando, estis imitita de multaj homoj kaj fariĝis kutima ŝerco de libertempaj babildadoj. En la postaj 20 jaroj la aktoro neniam malaperis el la televidaj prezentadoj. Diversaj reklamoj kaj turneoj tra la tuta lando alportis al li grandan famon kaj gigantan profiton. Nun li tenas Median Grupon, kiu havas kelkajn filiojn kaj branĉojn pri prezentado, filmado, televido kaj trejnado de aktoroj. Tiun brilan sukceson alportis al li la ĉina centra televido dank' al sia granda influ-povo.

Sed tio ne estas la sola ekzemplo. En la pasintaj pli ol 20 jaroj la televida prezentado de la Printempa Festo sukcesigis multajn aktorojn. En la jaro 1984 Zhang Mingmin, kantisto el Honkongo, estis invitita al la televida prezentado. La kanto "Mia ĉina koro" profunde emociis multajn televidantojn ĝis larmoj kaj fajrigis patriotan flamon de la ĉinoj. Li diris: "Mi prezentis la kanton almenaŭ 10 mil fojojn en formalaj okazoj, kaj mi estas certa, ke ĉirkaŭ 100 milionoj da ĉinoj scipovas ĝin kanti." En la jaro 1987 kantisto Fei Xiang (la angla nomo: Christian Rand Phillips), naskiĝinta en ĉin-usona familio de Tajvano, partoprenis la prezentadon. Lia kanto "Nubo de la hejmloko", plena je nostalgiaj sentoj, vekis fortan sopiron de transmaraj ĉinoj pri la patrujo. Lia eleganta kaj ekzota aspekto ravis multajn knabinojn, kaj lia hararango fariĝis tre populara por longa tempo. Poste Fei Xiang brile sukcesis kiel kantisto kaj reklama figuro.

Laŭ la leĝoj de merkato

Ĉi-jare Zhao Benshan refoje aperis en la televida prezentado. Li kaj tri roluloj, interalie du liaj lernantoj, knabo kaj knabino, prezentis al la publiko la skeĉon "Al mi ne mankas

mono". La knabo fariĝis la protagonisto kaj sukcese rolis restoracian kelneron. La skeĉo rakontas pri lert-spirita kaj iom ruza maljuna vilaĝano, kiu regalis en restoracio reĝisoron de la ĉina centra televidstacio por rekomendi al li sian nepinon. Burleska dialogo kaj la groteska kelnero parolanta kun virineca akĉento kaj vestita per blanka ĉemizo kaj kilto el kvadrata ŝtofo, ridigis kaj ĝojigis la televidantojn. Per tiu skeĉo Zhao Benshan faris sukcesan merkataĉon por siaj lernantoj. La knabo nun estas bone konata en Ĉinio kaj akiris multajn kontraktojn. Nun en restoracioj kaj distrejoj oni emas ŝerci kun kelneroj per la furora parolo "Al mi ne mankas mono".



Fei Xiang

Ĉinio estas grandega merkato. Pli ol miliardo da televidantoj forte allogas reklamistojn kaj sponsorojn. Televida prezentado de la Printempa Festo alportis al la ĉina centra televido grandegan profiton. Ĉi-jare la reklama

enspezo de la prezentado atingis 600 milionojn da juanoj (ĉirkaŭ 60 milionoj da eŭroj). Tamen la organizanto sentas premon de la kritikema publiko, ĉar oni ĉiam atendas novajn prezentojn.

ARTIKOLO

Cerbaj Olimpikoj

Televidaj programoj, en kiuj la partoprenantoj konkuras unu kun la alia per siaj intelektaj kapabloj, nuntempe okupas firman lokon en la plano de televidaj sendaĵoj tutmonde. Foje tiuj sendaĵoj estas montrataj en multaj landoj laŭ licenco (ekzemple, la plej fama programo “Kiu fariĝos milionulo?” aperas en 107 landoj) sub la samaj aŭ aliaj nomoj (ekzemple, la usona programo “Jeopardy!”, “Risku!” en la angla, aperas en la rusa televido sub la nomo “Propra ludo”) kaj ofte en iom adaptita formo. Tamen, en multaj landoj ekzistas ankaŭ unikaj propraj programoj, kiuj, parte pro ties pli intima ligiteco al la koncerna kulturo kaj lingvo, parte pro manko de taŭga merkato, restas ĝueblaj nur por unu lando. Unu el tiuj programoj estas ege populara en Ruslando “Kio? Kie? Kiam?”, pri kiu Kontakto raportis eĉ kelkfoje. En la artikolo mi volas rakonti nur pri kelkaj programoj, kiujn oni povas spekti en Ruslando kaj Germanio, kie mi vivis kaj nun vivas.

Aleksandro Galkin, Rusio/Germanio

Parto unu: Internaciaj intelekt-ludoj

Esperanto-titolo: *“Kiu volas esti/fariĝi milionulo?”*

Internacia titolo: *“Who wants to be a millionaire?”*

Mallonga priskribo: *“Unupersona kvizo, diversvaloraj demandoj kun 4 proponataj respondoj.”*

Demando-ekzemplo: *“Vidu en la teksto.”*

Sendube, ĝi estas programo la plej konata kaj spektata de la plej granda aŭditorio. En tiu ludo oni povas per siaj scioj gajni sufiĉe decan monsumon, kies fakta valoro povas variu depende de la loka valuto. La valoro de ĉiu sekva demando estas proksimume duoble pli granda, ol tiu de la antaŭa, kaj oni devas respondi de 12 ĝis 15 demandojn, ĉiam elektante unu korektan respondon el la 4 proponitaj. La unua malĝusta respondo tuj kondukas al fiasko, kvankam depende de la kvanto de la jam responditaj demandoj la partoprenanto povas tamen ricevi ioman gajnon (kutime du monsumoj en la mezo de la ludo estas “neperdeblaj” kaj la plej granda atingita sumo el tiuj restas kiel fina monsumo okaze de fiasko).

Por iom diversiĝi la ludon partoprenantoj rajtas uzi 3

tiel nomatajn ĵokerojn, kiuj varias de lando al lando. Jen estas kelkaj el ili:

1. Telefonvoko al amiko.
2. 50/50 – du malĝustaj respondoj malaperas.
3. Voĉdono de la publiko (ankaŭ konata kiel “helpo fare de la salon-publiko”).
4. Ŝanĝo de la demando.
5. “Tri saĝuloj” (tri elektitaj ekspertoj, kiuj rajtas doni konsilon).

Ĉefe la demandoj estas pli-malpli respondeblaj kaj ordinara homo facile respondas 5-6 demandojn, ricevante proksimume 1/20 de la ĉefa gajno.

Unu el la plej amuzaj momentoj en tiu programo okazis, kiam la plej unua venkinto en tiu ludo, John Carpenter, havis la jenan finan demandon por \$1 000 000:

“Kiu el usonaj prezidentoj aperis en la televida serio ‘Laugh-In?’”

- | | |
|------------------|-----------------|
| A Lyndon Johnson | C Richard Nixon |
| B Jimmy Carter | D Gerald Ford |

Li uzis sian lastan ĵokeron por alvoki sian patron, kaj liaj unuaj vortoj al la patro estis “Saluton! Nu, mi ne vere bezonas vian helpon, ĉar mi ja scias la ĝustan respondon, mi simple alvokis vin por diri, ke ni gajnis unu milionon!”¹.

Esperanto-titolo: *Risku!*

Internacia titolo: *Jeopardy!*

Mallonga priskribo: *Tripersona kvizo, diversvaloraj demandoj ordigitaj laŭ valoroj kaj temoj sen respond-proponoj, kelkaj rundoj kun iom malsamaj reguloj.*

Demando-ekzemplo: *Katarina Mediĉi ŝategis tiun legomon, kies ŝelojn oni deprenas per dentoj kaj poste manĝas.*

Tiu televid-programo ege populariĝis ne nur en Usono, sed ankaŭ en Ruslando sub la nomo “Propra ludo”, kontraste al Germanio, kie la analogia programo “Riskant!” travivis nur kelkajn sezonojn kaj ne plu estas montrata.

La ĉefa specifaĵo de la programo estas demandoj, por kiuj oni ne donas respond-variantojn – la partoprenantoj devas memstare doni korektan respondon. Demandoj estas ordigitaj laŭ temoj kun diversaj titoloj, ekz. “Filmoj”, “Ruĝa koloro”, “Nur unu litero” ktp., kaj oni povas diveni la respondon (aŭ almenaŭ draste redukti la aron de respondoj) laŭ la tem-titolo. Ene de unu temo demandoj estas ordigitaj laŭ ties malfacileco kaj valoro, de 10 ĝis 50 poentoj. Se oni ĝuste respondas iun demandon, ties valoro estas alkalkulata al la poentoj de la respondinto, malĝusta respondo kondukas al la subtraho de la demando-valoro de la poentoj. La ludo okazas en kelkaj rundoj, kutime en la dua rundo la kosto de demandoj duobliĝas. Krome, ekzistas aparta fina rundo, en kiu la partoprenantoj rajtas mem difini la valoron de la sola demando, sed riskas perdi tiun valoron okaze de malĝusta respondo.

Krom kutimaj demandoj foje venas “specialaj” demandoj, ekzemple demandoj kun muziko aŭ foto kaj demandoj, kiam partoprenantoj mem rajtas proponi la valoron de la demando – kaj ĝuste la proponinto de la plej granda valoro ricevas la eblon respondi la demandon.

Tiu ludo aperas en kelkaj famaj usonaj filmoj (ekzemple en “La tago de marmoto”), kie oni kutime substrekas la tre altan nivelon de la demandoj kaj grandan eruditecon, kiu estas postulata de la partoprenantoj. Verdire, multajn demandojn eblas respondi ankaŭ sen profundaj scioj kun iom da praktiko, ĉar la tem-titoloj estas tre helpaj kaj demandoj de tempo al tempo ripetigatas en modifita formo. En Ruslando unu el la plej famaj ludantoj, Anatolij Vasserman, kiu ankaŭ havas sufiĉe specifan aspekton, fariĝis simbolo de erudito.

Esperanto-titolo: *Rado de Fortuno*

Internacia titolo: *Wheel of Fortune*

Mallonga priskribo: *Tripersona kvizo, oni devas politere diveni la vortojn, kiuj estas ŝirmitaj per tabuletoj, turnante la specialan radon kun gajn-valoroj.*

Demando-ekzemplo: *Sur tabulo estas vorto el 7 literoj, klarigo: “Neniu parto de mita estaĵo, sed parto de tempo-mezurilo!”.*



Tiu ĉi programo, kiu estas adapto al la televido de tre fama tabul-ludo “pendumilo”, estas pli distra ol pensiga. Tri partoprenantoj devas diveni la nocion laŭ mallonga priskribo. Oni devas elekti unu literon kaj en speciala tabulo, kie la tuta nocio (kiu povas havi kelkajn vortojn) estas skribita, oni malfermas la ŝildeton kun tiuj literoj, dum literoj, kiuj ankoraŭ ne estis nomitaj, restas ŝirmitaj. Ĉiu partoprenanto unue devas turni la specialan radon, per kiu estas difinata la valoro de lia ĝusta respondo. Kiel respondon oni povas diri aŭ literon (tiam la suma gajnita mono estas multobligata per la kvanto de literoj, kiuj estas malfermitaj) aŭ la tutan nocion. Ekzistas kelkaj rundoj kun diversaj premioj kaj ankaŭ tiel nomata “superrundo” (“superludo”) kun grandvaloraj premioj – aŭtoj ktp.

En Ruslando tiu ludo estas konata sub la nomo “Kampo de mirakloj” kaj estis lanĉita en 1990 fare de fama ĵurnalisto Vladislav Listjev. Li, tamen, poste redonis la gvidan rolon al Leonid Jakuboviĉ, antaŭe – tute nekonata homo, kiu entute ne estis profesia ĵurnalisto aŭ artisto, sed tamen sukcesis transpreni la ludon kaj jam dum pluraj jaroj gvidas ĝin. La ludo mem ekhavis multajn tradiciajn elementojn, ekzemple, multaj partoprenantoj nun alportas donacojn al Jakuboviĉ, kiuj estas kolektataj kaj gardataj en la muzeo de la programo.

Pro ties klara kliniĝo al sufiĉe simplaj demandoj kaj entute “proleteco” de la tuta programo oni ofte kritikis ĝin kaj nun apenaŭ alkalkulas al intelektaj programoj, kvankam tio neniom damaĝas ĝian popularecon – ĝi estas montrata

jam dum jardekoj en la plej bona spektotempo (vendrede vespere en la unua televidkalano de Ruslando).

Esperanto-titolo: *Malforta ĉenano*

Internacia titolo: *Weakest Link*

Mallonga priskribo: *Teama kvizo kun individua gajno, la plej malsukcesa partoprenanto de ĉiu rundo estas forpelata ĝis nur unu restas.*

Demando-ekzemplo: *‘Kiu vorto komenciĝanta per “Ks” (X) signifas timon pri stranguloj aŭ fremduloj?’*

Tiu programo estas aparte interesa pro kombinita teama kaj individua ludo. La demandoj estas proksimume de la sama malfacileco kaj estas starigataj laŭvice al ĉiuj partoprenantoj. Kiam kvanto de ludantoj estas pli ol 3, ĉiu partoprenanto, kiam estas lia vico respondi, povas aŭ tuj diri “Bank!” antaŭ ol la demando estis voĉigita, aŭ provi respondi demandon. La ĉefa ideo estas, ke ĉeno de ĝustaj respondoj kostas multe pli, ol unuopa korekta respondo: ekz. 3 ĝustaj respondoj sinsekve en la rusa versio de la ludo alportas ĉ. 500 rublojn, dum ĉiu aparta demando nur ĉ. 100. La ĉeno “ŝiriĝas” se oni donas malĝustan respondon (tiam la tuta kolektita mono estas for) aŭ se iu ludanto diras “Bank!” (tiam la ĝis nun kolektita mono venas al la komuna konto de la teamo).

Post ĉiu rundo oni kalkulas, kiom da mono donis ĉiu el la partoprenantoj kaj difinas tiun, kiu alportis malplej – kaj tiu devas forlasi la ludon. Fine de la ludo restas nur du partoprenantoj, ili devas respondi certan kvanton da demandoj jam sen konstrui la ĉenon. La programo en pluraj landoj havas similan econ: ĝi estas gvidata de ina gvidantino, kiu estas tre rigora kaj eĉ agresema kontraŭ la ludantoj.

Parto du: lokaj programoj.

Esperanto-titolo: *‘Kio? Kie? Kiam?’*

Internacia titolo: *‘Ĉto? Ĝde? Kogda?’*

Mallonga priskribo: *Teama kvizo kun la demandoj, alsenditaj de televid-spektantoj.*

Demando-ekzemplo: *En la domo de Morto, priskribita en scienc-fikcia romano de Terry Pratchett, ĉiuj ujoj havis ne nur emblemojn kun kranio kaj ostoj, sed ankaŭ enhavis unu literon. La formon de tiu litero havis ankaŭ la objekto, fiksita ĉe la ekstera flanko de la enirpordo. Kiu estas tiu litero?*

Tiu programo estas sendube la plej fama kaj plej populara intelekta televida produkto en Ruslando kaj en

multaj rusparolantaj landoj, kie ĝi nun aperas ankaŭ en la lokaj lingvoj (ukraina, kartvela, belorusa). La ludo mem kaj la reguloj jam estis kelkfoje priskribitaj sur la paĝoj de *Kontakto*, pro tio nun mi donas nur resumon: unu teamo ludas kontraŭ teamo de televid-spektantoj, kiuj alsendis siajn demandojn. Demandoj povas esti liberaj – aŭ surbendigitaj kaj filmitaj de la televidspektantoj mem, aŭ simple voĉlegitaj de la program-gvidanto, enhavi diversajn objektojn (ekz. pentraĵojn, muzikon ktp). Teamo el 6 homoj havas unu minuton por respondi tiun demandon kaj ricevas unu poenton okaze de ĝusta respondo. Malĝusta respondo donas unu poenton al la teamo de televidspektantoj kaj la teamo, kiu sukcesis akiri 6 poentojn, venkas.

En Ruslando la kulto de tiu ludo estis forte ligita al la kulto de ties iama kreinto kaj dumlonga gvidanto Vladimir Vorosilov, kiu mem fariĝis enpersonigo de senpartia krupiero, kaj kies inter-ago kun la teamo ofte estis ne malpli interesa ol la demando mem. Famaj ludantoj tuj fariĝis konataj en la tuta lando kaj oni konas tiujn same bone, kiel konatajn aktorojn. La ludo naskis ĉirkaŭ si grandan movadon, kiu sufiĉe baldaŭ establiĝis kiel “sporta KKK” kun propraj reguloj kaj turniroj. En la plej grandaj turniroj samtempe en pluraj lokoj povas ludi ĉ. 3 mil teamoj, do proksimume 15 mil homoj. La ludo estas ofte organizata kiel parto de diversaj konkursoj, ekzemple dum studentaj renkontiĝoj aŭ inter-firmaaj aranĝoj.

La ĉefa specifaĵo de la ludo estas la demandoj, kiuj kutime postulas aŭ tute neniujn fakajn sciojn, aŭ nur tiujn de la kutima mezlernejo. La respondo estas tiom logika kaj malambigua, ke kiam oni trovas ĝin, ĝi, slange, “klakas” kvazaŭ fulmo. Certe, ne ĉiu demando elvokas tiun senton, sed demandoj, kiuj postulas rektan scion (ekzemple, “Kiel nomiĝis la tridek-kvara prezidento de Usono?”) neniam aperas en la ludo – eĉ se iu scio estas postulata, la ĝusta respondo ĉiam baziĝas sur logiko kaj postulas almenaŭ unu logikan konkludon.

Esperanto-titolo: *Genie mise*

Internacia titolo: *Genial daneben*

Mallonga priskribo: *Kvarpersona teamo provas deĉifri la sencon de plejeble multaj leksikonaj glosoj, kiujn oni antaŭe ne konis.*

Ekzemplo de demando:

‘Volapük’

1. *Kirgiza nacia manĝaĵo: gulaŝo el ĉevalaĵo kun saŭco kaj pom-kompoto.*
2. *Plata sledo kun tre larĝaj glitiloj, kiujn eskimoj uzas por var-transportado.*
3. *Internacia helpolingvo, kreita de pastoro M. Schleyer (1831-1912) el Konstanz.*

4. *Origine el la franca volà-prique. Milita: Punritualo de Fremda Legiono en Norda Afriko, kiam la punito estis alligata al virŝafo, kiun oni pelas trans river-torento. Nuntempe estas uzata kiel sinonimo por bastonpuna rundo kaj torturo, ekz. "Tiu ĉi grimpado estis pura Volapuko".*
5. *Supramantela vestaĵo de prusa uniformo (ekde 1740).*
6. *Dolĉ-akva lago kun tre malalta oksigen-enhavo, ekz. en vulkanaj regionoj.*
7. *Akronimo por 'Vodafone-Laptop-ÜbertragungsKabel' (Tekokomputila kablo de Vodafone).*

Fakte tiu programo estas ne vera kvizo, sed pli distra kaj komedia prezentaĵo kun speciale invititaj komediuloj. La programo mem baziĝas sur la tiel nomata "leksikona ludo", kiam teamo devas diveni la sencon de proponita leksikona gloso, antaŭe nekonata al la partoprenantoj, laŭ ties skrib- aŭ prononcmannerio. La terminoj estas alsendataj de la spektantoj kaj elstas kontrolataj kaj elektataj fare de la redakta teamo de la programo.

Pro tio, ke la ludo estas antaŭ ĉio distra, oni ofte ricevas vortojn, kiuj aludas aŭ implicas (sed plej ofte reale tute ne rilatas) seksumadon aŭ similajn aferojn. La programo estas produktata en la germana lingvo, tial oni ofte uzas diversajn lokajn vortojn el la germanlingva lingvomedio (ekzemple, lokajn vortojn el Aŭstrio aŭ Svisio). Kvankam la celo de la ludo estas deĉifri maksimuman kvanton de tiuj

nocioj, tio ne estas la ĉefcelo; la amuza deĉifro, farata de profesiaj komediuloj kaj invititaj eminentuloj por amuzaj vortoj, estas jam per si mem la atingita celo.

REFERENCJOJ

1. Tiun momenton oni povas spekti ĉi tie:
<http://www.youtube.com/watch?v=AeqPJoJGqxc>
2. Demando pri Volapuk estas tute reala kaj prenita de la jena retpaĝo:
<http://www.marcosmos.de/lexikon/begriffe.html>

ĜUSTAJ RESPONDOJ

1. "Milionulo": C
2. "Risku!": artiŝoko
3. "Rado de Fortuno": gnomono
4. "Malforta ĉenano": ksenofobio
5. "KKK": Estas greka litero omega, kiu iom similas la hufo-feron. Tiun formon havis la frapilo (kaj samtempe ankaŭ tenilo); la litero estas la lasta en la greka alfabeto.
6. "Genie mise": divenu mem! ;)

ARTIKOLO

Zhuang – malmulte konata popolo de Ĉinio

Nuntempe mi havas la bonŝancon vivi en Pekino, en Ĉinio, kiu estas multe pli mult-etna lando, ol la eksteruloj ofte supozas. La Ĉinia registaro oficiale rekonas 56 malsamajn etnajn grupojn (民族, aŭ minzu en la ĉina lingvo) ene de la limoj de Ĉina Popola Respubliko. La plej granda el tiuj etnoj, la Han, inkluzivas 90% de la loĝantaro de ĈPR, kaj tio nature igas ĝin la plej granda etna grupo en la mondo.

Gabriele Corsetti, Italio

La restantaj 55 etnaj grupoj de Ĉinio estas nomataj Ĉine 少数民族 (*xiaoshu minzu*), alivorte "minoritataj etnoj". Ili kutime parolas aliajn lingvojn krom la ĉinan kaj retenas apartajn tradiciojn. Kelkaj el ĉi tiuj etnaj grupoj, kiel la tibetanoj aŭ la uĝuroj, estas relative konataj en la Okcidenta mondo, sed la plejmulto el ili estas absolute nekonataj ekster la limoj de Ĉinio. Multaj provincoj de

Ĉinio, kie loĝas rimarkinda kvanto de la minoritataj etnoj, havas specialan aŭtonomion (kaj tio inkluzivas Tibeton kaj Ŝingĝangon).

Dum la lasta "printempa festo" (ferio pro la Ĉina Nova jaro), mi havis la ŝancon viziti la Ĉinian provincon Guanĝi, unu el la aŭtonomaj provincoj. Tiu provinco, kiu troviĝas apud la limo kun Vjetnamio, enhavas multajn malsamajn



Kelkaj reprezentantoj de la popolo Zhuang, fotita de Jialiang Gao, permesilo CC-BY-SA

etnojn, sed la plej granda etna grupo en la regiono estas la popolo Zhuang (prononcu ŝuang). Ĉi tiu minoritato nombras ĉirkaŭ 18 milionojn da homoj kaj estas la dua plej granda etna grupo de Ĉinio post la hanoj. Kvankam ili estas pli multnombraj ol, ekzemple, hungaroj aŭ ĉilianoj, ilia nomo verŝajne ne estas konata al la ne-ĉinaj legantoj de ĉi tiu revuo.

Mia vizito al tiu regiono de Ĉinio, tiel malproksima de Pekino, okazis pro tio, ke en mia Pekina universitato mi konatiĝis kun studentino, kiu origine venas de tiu regiono, kaj ŝi invitis min veni kaj sperti la nov-jaran festadon en ŝia familia hejmo. Ŝia familio loĝas en tre eta vilaĝo en la montoj de Guanĝi, kaj tie mi pasigis pli ol unu semajnon dum la nov-jara periodo (ĉirkaŭ la fino de januaro). La vilaĝo estis tre eta kaj simpla, kaj estis nur unu vendejeto en ĝi. La interreto tute ne estis havebla en la vilaĝo. Kvankam la viv-kondiĉoj estis tre simplaj laŭ la Okcidentaj normoj (kaj ankaŭ laŭ la “urbaj” ĉiniaj normoj), tamen mi ne ricevis impreson de terura malriĉeco, kaj la lokuloj aspektis feliĉaj. Kompreneble, kiel eksterlandano mi altiris sufiĉe multe da atento kaj scivolemo.

En la vilaĝo ĉiuj loĝantoj apartenis al la etna grupo Zhuang. Ĉi tiu popolo konservas lingvon absolute ne parenca al la ĉina, kiu fakte apartenas al la Taj-kadaja lingva grupo – la sama, al kiu apartenas la lingvoj de Tajlando kaj Laoso. Kvankam en la vilaĝo ĉiuj parolis la lokan lingvon, laŭ mia sperto ĉiuj loĝantoj regis ankaŭ Pŭtōnghuà, alivorte la norman ĉinan. La lokaj lernejoj instruas en la ĉina, same kiel preskaŭ ĉie en Ĉinio, kaj la televidiloj, kiuj troviĝas preskaŭ en ĉiu domo, ankaŭ helpas disvastigi la konon de la ĉina. La lingvo Zhuang estas kutime uzata nur por parolado, ne por skribo, sed tamen oni kreis manieron transkribi la lingvon per la latina alfabeto, kaj mi ja rimarkis kelkajn skribaĵojn en la lingvo Zhuang dum mia restado



Tradicia danco de la popolo Zhuang, publika posedo

en la regiono. Oni ankaŭ povas rimarki, ke sur la oficialaj ĉinaj mon-biletoj la valoro de la biletoj estas indikita ne nur en la ĉina, sed ankaŭ en la tibeta, la uigura, la mongola kaj la Zhuang-lingvo, alivorte – en la ĉefaj minoritataj lingvoj de Ĉinio.

Kvankam ĉi tiu etno konservas sian propran lingvon, ĝi fakte estas unu el la minoritatoj, kiuj pli asimiliĝis al la tradicioj kaj vivstiloj de la hanoj. Dum mia restado en la vilaĝo mi spertis la festadon de la ĉina nov-jaro, kiu absolute similis al tio, kion oni spertus en aliaj partoj de Ĉinio. Dum la lasta tago de la jaro la loĝantoj iras al eta templo por la forpasintoj apud la vilaĝo kaj donas oferaĵojn al siaj forpasintaj antaŭuloj. La oferaĵoj inkluzivis kokinojn kaj falsajn mon-biletojn, kiujn oni bruligis por ke ilia valoro atingu la forpasintojn. La falsaj mon-biletoj ofte havas grandegajn ciferojn presitajn sur ili kaj skribaĵojn kiel “la banko de la infero” aŭ simile. Alia tradicio estas disŝiri la ruĝajn rubandojn, kiu estas algluitaj ĉirkaŭ la pordoj de la hejmoj, kun skribaĵoj en la ĉina, kiuj invitas bonŝancon kaj riĉecon por la hejmo. Disŝirinte la malnovajn, oni algluas la novajn rubandojn, kiu restas ĉirkaŭ la pordo ĝis la nova novjar-veno. Dum la nokto de la nov-jaro la

lokuloj eksplodigis nekredeblan kvanton da pireteknikaĵoj. Dum la tagoj kaj noktoj de la festivala periodo la vilaĝanoj pasigis multajn horojn ludante maĝangon, la faman ĉinan ludon, kontraŭ relative grandaj monsumoj. Ĝenerale, mi ne observis kutimojn kaj tradiciojn aliajn, ol tiuj, kiujn mi spertis en aliaj partoj de Ĉinio.

Dum ekskurso tra la montaro mi renkontis ankaŭ anojn de alia minoritata etna grupo, la Miao, kiuj estas iom

pli tradiciaj kaj ankoraŭ surportas tradiciajn vestojn. Oni diris al mi, ke ili estas trilingvaj, regante la propran lingvon, la norman ĉinan, kaj ankaŭ lingvon de la popolo Zhuang, kiu estas la ĉefa etna grupo de tiu regiono.

Kvankam mi certe ne povas nomi min mem spertulo pri la popolo Zhuang post nur dek tagoj da restado en ĝia regiono, mi tamen havis la ŝancon konatiĝi kun angulo de Ĉinio, kiu estas absolute nekonata en la Okcidento.

ARTIKOLO

Venu por ĝui

“Surplacen venu vi”, miks-formata KD de “Kaj Tiel Plu” kun 15 titoloj, karaoke-versioj de la kantoj, video, tekstolibreto. Eld. Vinilkosmo, 2009.

La kataluna bando “Kaj Tiel Plu”, kiu prezentas tradiciajn kantojn de Okcidenta Eŭropo (ĉefe katalunajn kaj okcitanajn) kaj ludas mezepokan muzikon, estas jam vaste konata en Esperantujo. Ilia unua albumo “Sojle de la klara temp” aperis en 2000, ĝin sekvis “Plaças al mi”, kiu estis eldonita en 2004. La nova albumo daŭrigas la bonajn tradiciojn de la grupo, sed ankaŭ prezentas kelkajn novajn elementojn.

Unue – la relativa kvanto de instrumentaj komponaĵoj videble kreskis. Entute sur la disko estas 15 eroj, el ili 5 estas senvoĉaj. Due, krom la jam tradiciaj por la grupo hispanaj, katalunaj kaj okcitanaj kantoj/muzikoj ĉi-foje eblas aŭdi 2 sefardajn (hispan-judajn), unu danan, unu anglan, unu kroatan kaj eĉ unu amazigan kanton (kiu venas el la norda regiono de Alĝerio). Fakte, tia varieco tute ne frapas la aŭskultaton, ĉar ĉiuj komponaĵoj estas same melodij kaj atentokaptaj.

Koncerne ĉion alian, eblas diri, ke preskaŭ nenio ŝanĝiĝis – la bando daŭrigas siajn proprajn tradiciojn kaj ja faras tion sukcese. La plejmulto de la muzikoj estas ludataj per gitaro, violono, kontrabaso kaj flutoj; sed foje aŭdeblas ankaŭ akordiono kaj alispecaj kord-instrumentoj; ankaŭ diversaj perkutiloj nemalmultas. La voĉa prezentado daŭre estas plaĉa kaj varia; multas plur-voĉaj fragmentoj. Mi ne estas specialisto pri la popola muziko, sed ŝajnas al mi, ke la bando sukcesis krei la necesan etoson kaj reprezentas ĉion plej fidele.

Bedaŭrinde, necesas agnoski, ke la kvalito de la tekstoj evidente cedas al la muzik-kvalito. En multaj lokoj la tekstoj ŝajnas iom “tranĉitaj” (mi ne scias, ĉu tia estis la originalo aŭ ĉu tio estas la peko de la tradukinto), kio malfaciligas ilian glatan komprenon. La kanto, tradukita el la amaziga lingvo,



ĝenerale prezentas ian strangan kombinaĵon inter traduko kaj simpla simil-sona reprezento de la originalo. Kelkfoje en la tekstoj troveblas ankaŭ krudaj eraroj (ekzemple, “por aĉeti al edzino bronzan ĉirkaŭman” kun perdita akuzativo), sed entute la tekstoj estas tre simplaj, kun multaj ripetoj, do ili certe ne forlogos tro multe da atento.

Laŭ la jam fiksita kutimo de Vinilkosmo, ankaŭ tiu disko enhavas ne nur videon, dank’ al kiu eblas ekvidi la artistojn kaj aŭskulti kelkajn negrandajn intervjuojn, sed ankaŭ mp3-dosierojn kun karaoke-versioj de ĉiuj kantoj.

La tekstolibreto aspektas tre plaĉe kaj enhavas ne nur la Esperantajn, sed ankaŭ la nacilingvajn tekstojn. Krome, apud la tekstoj troveblas etaj enciklopediecaj komentoj.

Mi sincere rekomendas la albumon al ĉiuj, kiuj ŝatas popolan kaj tradician muzikon – “Surplacen venu vi” nepre vin tuŝos!

Subtenu la agadon de TEJO!

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO en ĝia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi povas helpi ankaŭ al konkretaj agaderoj de TEJO.

Mondonacojn por ĝenerala agado de TEJO bv. Pagi al la UEA-konto “tejtej” (indiku la celon de la donaco, ekz: “donaco por KER” aŭ “donaco por landa agado”). Ankaŭ eblas fari donacon por specifaj celoj:

- Fonduso “Partoprenu IJKon” – per ĝi TEJO subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj en IJK;
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO.

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe <www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html> aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

JUNA AMIKO – Internacia E-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

- aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

Modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), *enhavo tre varia*: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <www.junaamiko.inf.hu> aŭ en <www.lernu.net>!

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al Koresponda Servo Mondskala jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj.

Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, ne uzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: **Koresponda Servo Mondskala, B. P. 6, FR-55000, Longeville-en-Barrois, Francio**

KOTIZTABELO DE UEA POR 2009

MG Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T) Membro kun Jarlibro (kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago)

MA(-T) Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto

MA ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto, kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon Kontakto

SA Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA

Kto Abono al la revuo Kontakto, sen membreco en UEA/TEJO

SZ Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	16	40	100	60	36	200
Aŭstrio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Belgio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Brazilo/eŭro	5	12	30	18	11	60
Britio/pundo	7	18	45	29	18	90
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	425	2100
Danio/krono	70	175	440	280	180	880
Estonio/krono	100	240	600	380	245	1200
Finnlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Francio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Germanio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Greklando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Hispanio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Hungario/forinto	1600	4000	10000	6400	4000	20000
Irlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Islando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Israelo/eŭro	7	18	45	27	16	90
Italio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Japanio/eno	1500	3700	9200	5500	3300	18400
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Latvio/lato	4	11	27	17	11	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Norvegio/krono	75	190	470	280	170	940
Nov-Zelando/dolaro	20	50	125	75	45	250
Pollando/zloto	20	50	130	80	50	260
Portugalo/eŭro	8	20	50	32	20	100
Rusio/eŭro	5	12	30	18	11	60
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	17	84
Slovenio/eŭro	7	18	45	29	18	90
Svedio/krono	90	220	550	350	220	1100
Svislando/franko	15	38	95	57	34	190
Usono/dolaro	13	32	79	47	28	158
TARIFO A/eŭro	6	16	40	24	14	80
TARIFO B/eŭro	5	12	30	18	11	60

ALIAJ LANDOJ Luksemburgo laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.

TARIFO A Honkongo, Korea Resp., Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Diskuto inter surduloj

Woudji Kossi (Togolando/Senegal)

facila

Iam vivis tute **surda** virino. Ĉiumatene ŝi iris por labori sur sia kampo, tenante sian infaneton sur la dorso. Foje, dum ŝi laboris en la kampo, ŝi ekvidis la viron. Tiu viro aliris ŝin kaj demandis: “Virino, mi serĉas miajn **ŝafojn**; iliaj post-signoj kondikis min al via kampo. Ĉu vi povas montri al mi la lokon, kie ili estas? Inter miaj ŝafoj estas unu **vundita**, kiu mis-paŝas. Se vi sukcesos helpi al mi trovi mian ŝafaron, mi donacos al vi la vunditan ŝafon.

La virino, kompreneble, nenion komprenis, ĉar ŝi nenion aŭdis. Ŝi pensis, ke la viro demandis ŝin, kie estas la limo de ŝia kampo. La virino levis la dekstran manon kaj respondis al la viro: “Mia kampo estas tre granda; ĝi finiĝas ĉe tiu arbo, malantaŭ kiu estas la kampo de mia kuzino”. Malfeliĉe, ankaŭ la viro estis surda. Vidinde la man-signon de la virino, la viro kredis, ke ŝi montras al li la lokon, kie estas liaj ŝafoj. Li do ekiris laŭ tiu direkto kaj, bon-ŝance, trovis tie siajn ŝafojn.

En granda ĝojo li revenis al la virino kaj diris: “Vi estas bona edzino por via edzo. Mi iris en la lokon, kiun vi montris al mi, kaj trovis tie miajn ŝafojn. Jen la ŝafo, kiun mi promesis al vi, prenu ĝin!” – kaj li donis al la virino la vunditan ŝafon.

Vidante, ke la ŝafo estas vundita kaj mis-paŝas, la virino pensis, ke la viro kulpigas ŝin pri la vundado de la ŝafo. Ŝi mal-trankvil-iĝis kaj diris al la viro: “Mi ne vundis vian ŝafon, vi povas kulpigi kiun ajn, sed ne min. Mi tuŝis neniun el viaj ŝafoj kaj eĉ ne vidis ilin antaŭe”. Vidante, ke la virino maltrankviliĝas, la viro decidis, ke la virino ne volas akcepti vunditan ŝafon, sed volas ricevi la dikan kaj sanan. Kaj ankaŭ li maltrankviliĝis. Li diris: “Sinjorino, estas la ŝafo, kiun mi promesis doni al vi, ne estas alia. Mi ne donis al vi la promeson, ke mi donos al vi dikan kaj sanan ŝafon”. Kompreneble, virino iĝis eĉ pli maltrankvila; ili diskutis dum kvin horoj kaj fine ili ambaŭ trovis sin en juĝejo.

Laŭ la kutimoj de Afriko, la juĝon faras unu el la plej maljunaj kaj estimataj homoj. La juĝo okazas en publika loko kaj en ĉe-esto de multaj homoj. La viro kaj la virino venis al la juĝisto, sen-ĉese inter-parolante tre laŭt-voĉe. Post saluti la juĝiston, la virino ekparolis al li: “Mi laboris sur mia kampo, kiam aperis tiu viro kaj demandis min, kie estas la limo de mia kampo. Mi montris al li la limon kaj poste daŭrigis mian laboron. Li foriris kaj post iom da tempo li revenis kun mis-paŝ-anta ŝafo, kulp-ig-ante min, ke mi vundis ĝin. Ver-dire, mi eĉ ne vidis iun el liaj ŝafoj. Estimata juĝisto! Punu tiun viron!”

Poste ekparolis la viro: “Mi serĉis miajn ŝafojn. Iliaj post-signoj kondukis min al la kampo de la virino. Mi bone klarigis al la virino, ke, se ŝi sukcesos helpi al mi trovi

la ŝafojn, mi donacos al ŝi la vunditan. Sed ŝi volis ricevi ne la vunditan, sed la dikan kaj sanan. Tamen, mi ne promesis tian kaj mi ne povas donaci ĝin al ŝi. Tial ni estas ĉi tie. Bonvolu fari justan juĝon.”

Malfeliĉe kaj amuze, sed ankaŭ la juĝisto estis tute surda. Certe, li nenion komprenis, ĉar nenion aŭdis. Vidante la infanon sur la dorso de la virino, li decidis, ke la viro kaj virino estas geedzoj, kaj li pensis, ke temas pri simpla geedza mal-pac-iĝo. Li ekstaris de sur la juĝista seĝo kaj diris al la viro: “Sinjoro, tiu knabo estas via filo. Vidu, kiel li similas al vi. Laŭ mia vid-punkto, vi estas malbonulo. Se vi ankoraŭ-foje revenos ĉi tien kun la sama afero, mi mal-liber-igos vin por cent jaroj”. Poste la juĝisto parolis al la virino: “Tiaj simplaj mal-pac-iĝoj inter geedzoj ne devas konduki vin antaŭ tiel grandan hom-amason, ĉu ne? Vi ambaŭ iru hejmen. Mi estas certa, ke vi re-pac-iĝos”.

Aŭdinte tiun “interparolon” la ĉe-est-antoj ek-rid-egis. Vidinte, ke ĉiuj ridegas, ankaŭ la kompatindaj surduloj – la viro, la virino kaj la juĝisto – komencis ridegi tre laŭte, tute nenion komprenante.

Kaj nun provu respondi al demando: kiu do estas la plej surda?

KLARIGOJ

surda – kiu nenion aŭdas, ne-aŭd-kapabla

ŝafo – speco de hejm-igita besto, iom simila al

malgranda bovo kun longa, sed rondecata har-aro

vundi – fari damaĝon al vivulo

Karaj legantoj!

Via opinio pri la revuo *Kontakto* estas por ni ege grava. Tial ni decidis fari enketon, per kiu ni volas ekscii, kion vi ŝatas, malŝatas kaj volus havi en la revuo. Tio helpos al ni plibonigi *Kontakton* kaj prepari ĝin ĝuste laŭ via plaĉo.

La reta enketo estos atingebla inter la unua de decembro kaj la unua de februaro ĉe <http://tejo.org/limesurvey/>. Bonvolu viziti ĝin kaj informi pri ĝi viajn amikojn!

Antaŭdanke,
la Estraro de TEJO